# ADORU 353




3. Sepopa Vi trezor' de graco,
Vi fingro de la Dia man';
gloregas buŝo kun aŭdaco
la Patron pro la savo-plan'.

4. Bruligu lumon en l' animo,
penetru korojn per la am',
kaj nian korpon en deprimo
firmigu Vi per virto-flam'.

5. Repelu regon de l' malbono,
donacu pacon plu sen ĉes';
kaj dum nin gvidos Via sprono,
nin lasos kulpo kaj opres'.

6. Vidigu Patron laŭ la diro,
per Vi koniĝu Lia Fil',
je Vi, la el-ambaŭa spiro,
ni ĉiam kredu en humil'.

7. Glorata estu Patro Dio,
la Fil', vekita el la mort',
kaj Vi, Spirit', en harmonio,
ĝis mondo-fin' konsola fort'.

VENI, CREATOR SPIRITUS • M (O dass doch bald = Commandments): Guillaume Franc, Ĝenevo 1543, al la dekaloga kanto, EG 255, 490 kaj 532, GL 490, RG 816 kaj 777, KG 103, EM 357 kaj 664 • latina T: alskribita al Hrabanus Maurus 9a jc. • E: Guido Holz 1986* • simpla adapto de → 346